Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Decembro 2001 | 72-a jaro, n-ro 12 (1158)

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

ISSN 1163.0442 | MENSUEL/MONATA

http://www.multimania.com/satesperanto/ * retadreso: satesper@noos.fr**

1921-2001
80 -jara

SAT
sennacieca
asocio
tutmonda
ESPERANTO

Pacan Novan



jaron 2002


❑ **Manifestacio en Bruselo**, p. 170

❑ **Letero de N.I. Sekvojo,** p. 169

❑ **Libereco por Tomek,** p. 168

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj,

Vi tenas en la manoj la lastan numeron de la jaro 2001. Ĝi estas parte dediĉita al la 80-jariĝo de nia Asocio. Krom tio vi trovos en ĝi multajn interesajn informojn kaj ĉefe informojn pri granda manifestacio kiu okazos meze de decembro en Bruselo. Ni esperu ke multaj el vi partoprenos.

Kiel ĉiam, fine de la jaro, ni deziras al ĉiuj el ni sanon, pacon kaj pli bonan vivon. Al nia kara Asocio, ni deziru multe da novaj membroj kiuj alportu al ĝi novan elanon, kaj persistemon en la batalo favore al Laborista esperantismo. Bonajn festojn kaj ĝis nova kontakto en 2002.

Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj: http://www.multimania.com/satesperanto
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 51,70 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

KAMPANJO POR LA «FELIĈULOJ»



Prosperan
2002

Por akceli la kampanjon favore al niaj kompanoj de la grupo «PORTOS», la SAT-sidejo eldonis poŝtkarton (vidu sube):

SENDANTO :
NOMO :
ADRESO :
DATO :
SUBSKRIBO :

ELDONITA DE S.A.T.
67, av. GAMBETTA
75020 PARIZO (FRANCIO)

Al estro de Administracio
de la Prezidento de Rusio
s-ro Aleksandr Vološin,
ul. Iljinka 8/4
RU-101000 Moskvo,
Rusio - Russie

Ni petegas ĉiujn SAT-amikojn, ĉiujn responsulojn de SAT, ĉiujn LEA-ojn, mendi amase tiujn poŝtkartojn, disdoni ilin al gekonatoj kaj sendi ilin al la «Estro de la Administracio de la Prezidento de Rusio».

Ĉiu devas kontribui je tiu agado por la liberigo de niaj gekamaradoj.

Ni proponas la jenajn prezojn por tiuj poŝtkartoj:

10 ekz. = 10 FRF aŭ 1,52 €
50 ekz. = 30 FRF aŭ 4,57 €
100 ekz. = 50 FRF aŭ 7,62 €
plus sendokosto laŭ la pezo.

NI SAVU NIAJN GEKAMARADOJN !

OSIEK-PREMIO 2001


krokizo de Mégumi Sachs-Komamura

En '01 la OSIEK-anoj proponis 20 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*.
La 20an de julio, dum la IEK en Straznice, Ĉeña Respubliko, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Éli URBANOVA

pro originala verko:
Hetajro dancas
Gratulon!

La premio, 400 eŭroj, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuë kaj http://osiek.org

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio



Prosperan
2002



80 JAROJ
je la servo de laborista esperantismo

SAT 80-JARA !
KONTINUECO DE SAT !

Nia asocio naskiĝis ekzakte antaŭ okdek jaroj, en 1921. Se oni trafoliumas la kolekton de "Laborista Esperantisto", de "Sennacieca Revuo" kaj fine de "Sennaciulo" ekde 1924, oni povas konstati ke ĉiujn 10 jarojn la redakcio ne forgesis dediĉi artikolojn al la dek.., dudek... ktp.-jariĝoj. Escepte, kompreneble en 1941.... En tiu ĉi numero de Sennaciulo vi povas konstati ke la nuna redakcio elektis kel-

1921

Tre respektemaj pri tradicioj ni ne estas. La novjaraj bondeziroj plej ofte estas hipokritaj — almenaŭ senutilaj.

Ni tamen bondeziru, sed sincere : ĉiu partiano de l' kapitalista sistemo *ne* lernu Esperanton ; li pli utile rompu al si la kapon. Ĉiu socialisto, komunisto, anarkiisto *ellernu* la lingvon kaj abonu nian gazeton. Ĉiu jama abonanto varbu alian por ke ni havu almenaŭ 2.000 je la fino de l' jaro.

Tion farante niaj amikoj certe ĝuos sanon, kontentecon kaj bonhumoron ; ĉar tiajn bonaĵojn oni povas nur akiri per sindono al nobla idealo.

Ni do deziras ĉioman sindonemon al niaj subtenantoj. Ni deziras ankaŭ, ke ili havu sufiĉe da mono por veturi Prahon, kie ni fondos sennaciecan asocion tutmondan — mallongigite : S. A. T. — Aniĝante al S. A. T. ili fariĝos satanoj kaj konsekvence feliĉuloj. Tiel estu !

ESPERANTISTA LABORISTO.



2ª JARO — Nª 7-8 (18-19) ★ MONATA ★ JULIO-AŬGUSTO 1921

ESPERANTISTA LABORISTO

Ni faru revolucion en la spiritojn. HENRI BARBUSSE.

★ SOCIALISTA ★ SINDIKALISTA ★ KOMUNISTA ★ LIBERECANA ★ SENNACIECA ★

Redakcio : E. ADAM, 24, Boulevard Beaumarchais — PARIS (Francio) | Administracio : L. GLODEAU, 77, Rue de Bagnolet — PARIS (Francio)

NIA UNUA KONGRESO
Sub la honora prezido de HENRI BARBUSSE
PRAHA, 1-2-3-4 Aŭgusto 1921

Kara Kamarado (*),

...

HENRI BARBUSSE.

En julia-aŭgusta numero 1921 de Esperantista Laboristo, aperis artikolo pri la unua Kongreso de SAT.



2ª JARO — Nª 1 (20) ★ MONATA ★ OKTOBRO 1921

Sennacieca Revuo

Organo de la Tutmonda Laboristaro. ANTAŬE: ESPERANTISTA LABORISTO

Redakcio : E. LANTI, 24, Boulevard Beaumarchais — PARIS (Francio) | Administracio : L. GLODEAU, 177, Rue de Bagnolet — PARIS (Francio)



MONDLINGVO KAJ KLASBATALO

...

En oktobro 1921 «Sennacieca Revuo» anstataŭis «Laboristan Esperantiston»



1a Jaro, Nro 1 APERAS SEMAJNE 1. Oktobro 1924

ESPERANTO je la servo SAT de la tutmonda PROLETARO

SENNACIULO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

Sennaciulo!

Gravaj novajoj

...

ATENTU, REDAKCIOJ DE ESP. GAZETOJ!

Nur en oktobro 1924 aperas unua numero de Sennaciulo. Ekde tiam ĝi aperas regule ĝis hodiaŭ.



7-a JARO, No 342 LEIPZIG, 23. / 4. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE

LA NACIISMO EN PALESTINO

...

En la jaro 1931, SAT estas 10-jara

JULIO 1951

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

S.A.T. TRIDEKJARA

En la jaro 1951 Sennaciulo rememorigis la 30-jariĝon de SAT.

kajn el tiuj datrevenaj artikoloj por ilustri ĝin.
Ĉu dum tiu longa periodo SAT ŝanĝiĝis? Iuj respondos jes, la aliaj respondos ne!Pri la senduba kontinueco ni trovas konstantan intereson pri la sociaj, ekonomiaj, politikaj temoj, intereso gvidata de la volo modifi profunde la sorton de la laborista klaso. Sed ĉiuj SAT-anoj ne

MARTO 1964

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

SOCIA BATALO EN BELGIO

Sociaj bataloj estis ĉiam aktualaj en «Sennaciulo»

proponas samajn analizojn kaj samajn proponojn. El tio estiĝas diskutoj (kelkfoje disputoj), diskutoj kiuj montras ke SAT (kaj ĝiaj organoj) rolumas precipe kiel debatloko.
La informoj ricevitaj en la SAT-sidejo kaj tiuj konigitaj per la SAT-organoj povas esti materialo por niaj ĉiutagaj agadoj publikaj, ĉu sociaj, ĉu sindikataj, ĉu politikaj. Pro tio, ĉiuj SAT-anoj kaj SAT-amikoj ne hezitu nutri tiujn organojn per siaj dokumentitaj tekstoj.
Multaj SAT-anoj opinias ke la kreo kaj la uzo de INTERRETO ŝanĝis profunde nian SAT. Ĉu tiu nova komunikadsistemo ŝanĝis la projekton mem de SAT? Tio estas diskutinda, sed oni ne povas dubi ke ĝi instigis multajn SAT-anojn kaj ne-SAT-anojn al verkado. Tiel ni povas pliriĉigi la enhavon de niaj organoj kiuj tiele, povas pli bone ludi siajn du rolojn: informado kaj pensinstigado.
Okdek-jara, bela aĝo ! Ĉu post dudek ja-

Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

La Jubilea Kongreso en Parizo

En 1971 okazis granda SAT-kongreso en Parizo.

roj, en 2021, la tiutempaj SAT-anoj povos festi la centjariĝon? Tio dependas de la dinamismo de la nunaj membroj de nia Asocio.
Dum la 74-a kongreso de SAT en Nagykanizsa, oni povis fari du rimarkojn. Unue la kongresanoj aprobis la iniciatojn lanĉitajn dum la lastaj jaroj, kaj sugestis ke tiuj agadoj iru ĝis fina konkludo. Due, sufiĉe multnombraj kongresanoj (jam aktivaj aŭ ne en SAT) montris sian rolon efike agadi por la plibonigo de la vivo de nia Asocio. Ni esperu ke tiuj iniciatoj kaj projektoj profunde donos novan sangon al SAT. En tiuj lastaj linioj, la plej grava vorto estas: INICIATOJ ! Ili povas (ili devas) fonti el ĉiuj el ni, kaj ne nur de kelkaj unuopuloj. La formo de tiuj iniciatoj estas senfina: verkado de komunikoj, artikoloj, broŝuroj, organizado de kursoj de Esperanto en la lokaloj de la laborista movado (laborejoj, sindikatejoj, ktp), kreado de novaj



Prosperan
2002

Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

La iluzio pri demokratio

En la jaro 1981 ni traktis la staton de demokratio en Hispanio.

Sennaciulo

DEKLARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

SENNUANCA KONDAMNO DE TIUJ EVENTOJ

La Plenum-Komitato de SAT

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO ! LANTI


En 1991 la PK alprenis pozicion rilate al la Golfa milito.

SAT-grupoj, manifestacioj surstrate, prezento de SAT al la ĝenerala publiko (prelegoj, ekspozicioj, ktp), propono de kunlaborado al internaciaj instancoj (sindikatistaj konfederacioj, maldekstraj politikaj partioj, humanistaj asocioj) ktp. , ktp.
Tion kion vi ne faros, neniu alia anstataŭe faros !



Prosperan 2002

Pacon kaj sukceson en la batalo por pli justa mondo deziras al vi SAT



En la jaro 1971, okaze de la 50 - jariĝo de SAT, ĉeĥa Esperanto-Rondo en la kadro de la Uzina Klubo ROH Ŝkoda en Plzen, organizis ekspozicion «Esperanto kaj laborista movado». La ekspozicio montris la signifon de la lingvo por la laboristaro kaj ĝia monda interkompreniĝo. La klopodo por unuiĝo de monda laborista movado kulminis per fondo de SAT en Prago, en la jaro 1921.
Jen bela ekzemplo por ĉiuj SAT-grupoj kaj SAT-anoj, nepre imitenda.

El la Mondo

TROLABORANTAJ JAPANOJ NE ELTENAS LA LABORRITMON

Karoshi estas japana esprimo por labori ĝismorte. Sed nun la japanoj laciĝis pri la malhomeca laborritmo.

Kiam la ĉefministro Keizo Obuchi antaŭ kelkaj monatoj estis trafita de korinfarkto kaj kuŝis en komato ĝis li mortis post kelkaj semajnoj, la problemo denove aktualiĝis.

La atentigoj ĉirkaŭ tiuj ĉi korpe kaj fizike teruraj internaj bruldamaĝoj estas plimultigitaj post kiam pluraj entreprenoj estis devigataj pagi grandajn monsumojn al parencoj kiuj kontaktis tribunalojn kiam familianoj ĝismorte laboris aŭ memmortigis sin pro tro kruela premiteco.

- La japana sistemo estas kruela kontraŭ tiu, kiu elstare diferencas de aliuloj aŭ ne havas sufiĉe da fortoj. Multaj estas maldungitaj, diras Emi Hijino.

Ŝi naskiĝis en Treleburgo sed elkreskis en Japanio kun sveda patrino kaj japana patro, kaj ŝi ricevis sian edukadon en la Teknika Altlernejo de Chalmers en Goteburgo. Do ŝi povas kompari.

- La labortagoj en Japanio estas treege longdaŭraj kaj neniu iras hejmen antaŭ la ĉefo. Ĝenerale la kariero estas bazita sur la personrilatoj inter la ĉefo kaj la dungitoj. Estas la ĉefo kiu decidas kiu estu rangaltigata. Tial estas grave ke oni povas praktiki golf-ludadon kaj iri por manĝi kun kolegoj kaj superuloj post la fino de la labortago. Bedaŭrinde la sistemo ne favoras virinojn, kiuj ofte estas haltigitaj en siaj karieroj, diras Emi Hijino.

Antaŭ nelonge ŝi venis de Birka Energio en Stokholmo, kie ŝi laboras kiel diplomita inĝenierino. Sed estas en la Sveda Ambasadejo en Tokio kie mi renkontis ŝin. Post duonjaro ŝi troviĝas ĉe la Teknika Ataŝeo de Svedio, kie ŝi kontrolas la naturmedian sektoron de la lando. La gekolegoj estas plejparte japanoj. Kvankam svedoj kaj japanoj havas multon komunan rilate mensostaton, estas tamen multo kio diferencigas ilin, ĉefe kiam temas pri entreprena kulturo.

- La plej granda diferenco estas la hierarkio en la laborejoj. Ĝi estas multe pli videbla en Japanio. Oni havas certajn kadrojn kaj rolojn sur kiuj oni devas apogi sin kaj neniu povas elstariĝi.

Emi Hijino tial konceptas la svedojn kiel pli kreivajn.

En Japanio la homoj estas lertaj kaj efikaj. Sed ili bezonas gvidadon kaj instrukciojn la tutan tempon kaj ĉio estas tre strukturita.

Kaj ankaŭ se la kamaradeco en la plej multaj laborejoj, malgraŭ la malvastiga sistemo, estas bona, troviĝas multe da viktimigadoj kaj personatakoj.

Sed nun, antaŭ ĉio, la junuloj laciĝis. Ili ne intencas ĝismorte labori kaj esti lojalaj al siaj laborejoj.

Anstataŭe ili volas labori laŭ sia propra ritmo, havi tempon interrilati kun siaj familianoj kaj responsi mem pri siaj kondutoj. Tial ne estas strange ke gejunuloj, kiuj estas bone edukitaj, pli volonte dungiĝas ĉe Mc Donalds kaj en kafejoj, ol serioze entrepreni ion por iu kariero.

El "Avisen", 2000-06-03, Madeleine Salomon. Transprenita el SLEA-Informilo, junio 2001.

El la Mondo

UNUA TUTMONDA FORUMO PRI EDUKADO
Porto-Alegre, Brazilio
21-27.10.2001

Kiel scias niaj legantoj, tiu forumo pri edukado ĵus okazis. Estas por nia gazeto malfacile ricevi materialon riĉenhavan pri tiu okazintaĵo. Eĉ k-do LEDON kiu sendis al Sennaciulo suban artikolon, plendas pri la fakto ke en Brazilio mem li ne povis havi informojn. Jen la teksto :

Ekkonscio pri grandaj rompoj.

La Unua Tutmonda Forumo pri Edukado okazis en Porto Alegre, Brazilio, de la 21-a ĝis la 27-a de oktobro 2001, kun 10.000 invititoj laŭ la ĝenerala informado, aŭ kun 15.000 instruistoj, studentoj, sindikatistoj kaj pliaj sociaj fortoj, laŭ la organizantoj de la evento. Kiel okazis pri la Unua Sociala Forumo, la kunveno estis organizita de la politika partio, -Partio de la laboristoj- kiel preparaĵo por la dua Sociala Forumo baldaŭ okazonta. Pro tiuj faktoj, en la kutimaj ĵurnaloj, gazetoj kaj pliaj informiloj nenia informo pri la okazaĵo estis diskonigata, aŭ iel atingis la eksteran publikon krom el la PT-medio mem pere de iu agentejo kun nomo «carta maior» (eble: granda ĉarto!).



Deputitino Maria do Rosario kun Esperanto enmane. Fotis: J. Pacheco

Feliĉe en ĉi tiu «ĉarto» oni ekparolas pri grandaj rompoj kaj diras: «En la tempo en kiu ni vivas, en kiu la kapitalo, por pligrandigi sian profiton en koncentriĝo neniam vidita, kondukis al mizero kaj al milito, la plimulton el la tutmonda loĝantaro, oni devas kompreni ĉion ĉi kiel rompon.» «Hodiaŭ, en la nuntempa konjunkturo internacia, post la terorista frapo de la 11-a de septembro, de ĉiuj forpuŝita, fariĝis pli klara kaj la malekvilibro inter nordo kaj sudo, kaj la kreskanta foso inter riĉuloj kaj malriĉuloj, same kiel la danĝero de perforto devenanta el la malraciismoj, kiuj minacas ĉian ajn formon de civilizacio.» Kaj oni aldonas: *«Por la plimulto el la homoj, tamen, tiu ĉi rompo povas esti rigardata kiel la transiro de unu situacio al alia, en kiu la solidareco, la libereco, la egaleco kaj la respekto al la diverseco, reviviĝas kiel valoroj kunligitaj al la interkompreno kiu ekzistas nuntempe en la mondo, kun fortoj kaj riĉaĵoj kapablaj nutri la malsatantojn, kaj liveri materiajn kaj spiritajn kondiĉojn, inter kiuj la publika edukado, senpaga kaj kun kvalito socie referencita por ĉiuj.»*
Dume, kiam oni skribis tiujn tro longajn sed belajn frazojn, ĝuste la publikaj edukistoj strikas jam dum 70 tagoj. Same la publikaj oficistoj, de la tutlanda justico kaj de la sociala prizorgo kaj emeritado, kiuj de pli ol 90 tagoj daŭrigas siajn strikajn protestojn pro mizeraj salajroj pagitaj de publikaj regantoj t.e. la ŝtatoj. Samtempe konferencoj konstatis, ke la publikaj edukejoj ne plu plenumas sian taskon en Brazilio same kiel en la tuta mondo. La privataj, pagitaj lernejoj pli kaj pli revenas por ŝtopi la truojn sed sub la ŝildo de la konataj eklezioj kiuj majstras ne pri «raciismo» sed ĝuste pri obskurantismo.
Kaj mi rajtas aldoni, kiel analizanto de la afero, ke mi tute ne vidas, kiel la ankaŭ korupta «Partio de la Laboristoj - PT», en Brazilio, kiu modele intencas sekvi la «socialismon» de la maljuna diktatoro reganta de 40 jaroj Fidel Castro, sukcesos instali publikan edukadon «senpagan kaj kun kvalito socie referencita por ĉiuj».
En tiu ĉi forumo kelkdeko da esperantistoj sukcesis prezenti sian utopian varon al la 15 miloj da hermetikaj mensoj... ĉu guto konstante frapanta? ...

Gilbert Ledon

****

Al la lastaj linioj de tiu ĉi artikolo eĥas la raporteto de Miguel BOIERA VIANA, reprezentanto de UEA en Porto Alegre:



Prosperan
2002

Ĉi tie en Porto-Alegre ni sukcesis akiri multajn subskribojn al la deklaro pri lingvaj rajtoj de UEA. Multaj delegitoj ĝin subskribis. Ni disdonis milojn da faldfolio pri Esperanto. Hieraŭ la delegito Artur kaj samideano Ismael Avila prezentis tri prelegojn pri nia lingvo. Ni faris centojn da fotoj de delegitoj, deputitoj, de la urbestro kaj de la provincestro kun la faldfolioj kaj la deklaroj enmane. La fotojn vi povas vidi ĉe listo Esperanto-Br (diskutlisto por brazilanoj ĉe Yahoogroups/Egroups), kien Jozefo enmetos ilin. Ni ankaŭ sendos raporton al Brazila Esperantisto, Monato kaj Esperanto, por ke ĉiuj povu legi kompletan listigon de la laboro de la PortoAlegraj samideanoj, dum la Monda Forumo pri Eduko. Kun verdstelaj salutoj.

******

Ni povas aldoni ke en la franca gazeto "LE MONDE" (01/11/2001) aperis nur 15 linioj en kiuj unu frazo resumas la tuton:
"La Forumo pledas favore al publika edukado por ĉiuj kiel netransigebla rajto, garantiata kaj financata de la ŝtato, neakordigebla kun la leĝoj de la (ekonomia) merkato".
Vidita de laika ŝtato, tiu postulo povas aspekti banala aŭ eĉ arkaika. Sed ĉu en multaj landoj, ankoraŭ nun, la ebleco ĝui senpagan kaj laikan edukadon ne estas nur revo?



El la Mondo

Prosperan 2002

En Montpellier esperantistoj kontraŭ la tutmondiĝo

Okaze de proceso kontraŭ aktivuloj de Kamparana Konfederacio, kiu batalas kontraŭ la senbrida ekonomia tutmondiĝo, membroj de diversaj Esperanto-aktivuloj loĝantaj en urbo Montpellier kaj aliaj venintaj el urboj Béziers, Villeneuve-sur-Lot kaj kelkaj aliaj lokoj.



En Montpeliero la loĝantoj kaj kontraŭantoj al la senbrida ekonomia tutmondigado havis la eblon rimarki, ke la Internacia Lingvo ne estas fremda al la nuntempo: «Esperanto, la rimedo kontraŭ la tutmondiĝado. (Fotis: F. Bernard)

asocioj kolektiĝis la 15-an kaj 16-an de februaro 2001 en parko Peyrou de urbo Montpellier (FR) por esprimi sian subtenon al la koncernaj agrikulturaj sindikatistoj, kiuj estis akuzitaj pri detruo de plantitaj genetike modifitaj organismoj kaj pri parta malkonstruo de rapidmanĝejo MacDonald's. Inter la akuzitoj troviĝis populara kontestanto José Bové. La koncerna parko situas en la proksimeco de la loko kie kunsidis la juĝistoj.

Kadre de tiu homkolektiĝo, Thierry Saladin kaj Patrice Brandy - la ĉefaj motoroj de asocio «Réinsertion et Espéranto» - starigis budon por proponi la Internacian Lingvon kiel kontraŭvenenon, inter aliaj, al la senbrida ekonomia tutmondiĝo. Helpis ilin

La 16-an de februaro je la 15-a horo, la e-aktivuloj deprenis la montrobendon de la budo, por partopreni en marŝado, por kiu kolektiĝis ĉirkaŭ 15000 manifestaciantoj, kaj kiu daŭris 3 horojn kaj duonon. De fenestroj aŭ trotuaroj, multaj personoj rigardis, fotografis aŭ filmis. Samtempe, Emile Mas disdonis dokumentajn slipojn titolitajn "Asocioj fronte al tutmondiĝo" eldonitaj de la Informa-servo de SAT-Amikaro.

Ankaŭ estis prezentita franclingva informilo "Esperanto-Info" (9, rue du Chateau d'eau, 82290 Meauzac (FR)

Laŭ "SAT-Amikaro, okt. 2001

NOVAĴOJ TRA ESPERANTO-ATTAC

1. - Rusa Ĝenovo (Julio 2001)

Nombra kaj tre diversa delegacio el rusoj kaj ukrainanoj unuafoje partoprenis en internacia mobilizado. Tiu delegacio partoprenis ĉiujn agadojn kaj estis rimarkita dum manifestacioj de solidaraj kaj simpatiaj homamasoj. Kelkaj atestoj post ilia reveno konsistigas protokolon pri tiu vojaĝo por alia mondo.

2. Lecionoj de argentina krizo

Argentinio travivas senprecedencan krizon ; pli avia kraŝo ol alteriĝo. Ekonomio agonias, lando sensangas, homoj konstante vivas sub tranĉilego de ŝuldaro kaj ĉiuj aktivaĵoj submetiĝas al neverŝajna pago de interezoj. Tiu situacio tamen ne estas surprizo, sed disvolviĝo de prenitaj decidoj kaj IMF-ema ortodoksio.

3. Tutmondiĝo de rezistadoj

Internacia kunveno de sociaj movadoj ĵus okazis en Meksikio ariginte 250 homojn el 38 diversaj landoj. Temas interŝanĝi analizojn pri eventoj ekde jarkomenco kaj pri nuna situacio. Ankaŭ temas prepari la duan tutmondan socian forumon okazontan en Porto-Alegre en 2002.

RENKONTIĜO DE LA ASOCIO DE VERDULAJ ESPERANTISTOJ (AVE)

AVE kunligas politikon pri ekologio, socialecon, pacon, Homajn kaj Bestajn Rajtojn. Parto de la AVE-anoj aktivas en sialanda Verda Partio. M. Westermayer raportis :

Plurpaĝa fikcia artikolo "Esperanto für Europa" (Esperanto por Eŭropo) de Britta Loose estis publikigita en la diskutbaza libreto "Grün 2020" (Verdo 2020) de la germana verda partio; ĝi skizas argumentojn por la entiu delegacio partoprenis ĉiujn agadojnkonduko de Esperanto kiel komune akceptita internacia lingvo. Artikolo de M.W. pri la taŭga uzado de Esperanto rilate ĝemelaj urboj aperis en AKP, ĵurnalo por alternativa komunala politiko.

AVE-anoj tradukis la Tutmondan Ĉarton de la Verdaj Partioj, kiu rezultis el la tutmonda kongreso en Aprilo 2001 en Canberra (AU). S. Horvath, J., A. Bishop kaj B. Currie faris informstandon pri Esperanto kaj partoprenis en diskutrondoj. Sandor raportis pri siaj spertoj dum la kongreso kaj ankaŭ en Sennaciulo de majo; la raporto de Jenny estas en la nova AVENO 23.

Ni tradukis tekston pri la Komuna Ekstera kaj Sekureca Politiko de la Eŭropa Federacio de la VPoj (entute 39 en tuta Eŭropo) ĉefe pri pacema konflikt-solvado.

T. Auderskaja raportis pri la AVE-renkontiĝo en Nagykanizsa: pri la endanĝerigita ekologio en la deltao de la Dnjestro. Nur amasa protesto malhelpis la konstruadon de aŭtoŝoseo inter Ukrainio kaj Moldavio tra la kanejo de la ĉemarborda lago. Ŝi verkis filmon pri la vivo de birdoj tie. Ivo Peyraut, SAT, rakontis pri la klopodoj trovi justecon kaj liberigon por Billy Waldon, kiu estas arestita kaj akuzita pro hazarda aro de krimoj; li propagandis la malbonan respekton de Usono kontraŭ la indiĝenoj. En Usono oni devas pruvi sian senkulpecon; mankas mono por bona pledisto. Ni agu kune por aboli la mortpunon tutmonde. *El "Zagreba albumo" n° 5.*

ALVOKO DE A.I.S.

En 1987, dum la Jubilea SAT-kongreso en Bulonjo ĉe Maro, la Akademio Internacia de Sciencoj (A.I.S.) San Marino, subskribis sian kunlaborinterkonsenton kun SAT. De tiu momento A.I.S. multege agadiskaj ĝi estas unu el la kolonoj de la Esperanto-Movado.

De tempo al tempo, Sennaciulo eĥis pri ĝiaj agadoj. Hodiaŭ ni ricevis alvokon de A.I.S., ĉar ĝi intencas antaŭeniri kaj atingi pli altan ŝtupon.

Tiu nova etapo baziĝas sur tri principoj:

a) Ebligi al laŭeble ĉiuj internacilingvaj universitatnivelaj instruistoj kaj aliaj sciencistoj, ke ili investu en la klerigadlaboron de la Akademio parton de sia libera tempo, pri kiu ili disponas dum sia laborvivo forme de ferioj, kaj poste, kiel emeritoj, ajntempe.

b) Postuli ke la finstudintoj verku siajn disertaciojn dulingve, en sia preferata pensadlingvo kaj en la Internacia Lingvo. Tiel ne nur ĉi tiu evoluas kaj tiu konserviĝas kiel sciencolingvo, sed tiu ĉi "kognitiva dulingveco" kondukas al pli preciza vortigado kaj pli profunda pensado, liberigitaj de lingvecaj penskliŝeoj. Imitmodele kaj samcele verku dulingve ankaŭ la docentoj siajn kurslibrojn kaj TTT-kursojn.

c) Subteni la studadon kaj akademian karieron de junaj fortoj, ne lastavice per la ebligo de eksterlanda universitatpedagogia praktikumo. Ĝi okazu partoprenante en la internacilingva instruado en alia enkorpiĝejo de la Akademio. Por realigi ĉi tiun projekton estas bezonataj en diversaj urboj krom kurssalonoj ankaŭ po unu "akademidomo" minimume, por loĝigi la migrantajn docentojn kaj praktikumantojn; sed loĝĉambroj estos ankaŭ bezonataj por eksterurbaj studentoj.

Jen pluraj projektoj estas bone envojigitaj en la "Lucian-Blaga Universitato" de Sibiu Hermannstadt (Rumanio), en la Universitato "Konstantin" de Nitra (Slovakio), kaj kontaktoj pozitivaj ekzistas en Bulgario kaj Litovio.

Tiuj projektoj inkluzivas la aĉeton (aŭ konstruadon) de kurssalonoj kaj de apartementoj por la docentoj kaj la studentoj (prezo de ĉiu apartemento: inter 10.000 kaj 15.000 eŭrojn).

Utopio fariĝus la tuta projekto nur, se la Esperanto-movado preteratentus sian ŝancon. Mi alvokas ĉiujn finstudintojn, disponigi iom da tempo por la instruado, la verkado de instrumaterialoj aŭ por aliaj necesaj laboroj por funkciigi la planitajn fakultatojn kaj universitaton. Kaj mi alvokas ne nur scienculojn, sed same ĉiujn aliajn parolantojn de nia Internacia Lingvo, interesiĝi pri la rolo de kunposedanto de niaj estontaj akademidomoj, sen kiuj la universitateca laboro restus tro grandparte virtuala. Neniu perdos senrezulte monon aŭ rolus kiel nura mecenato, ĉar la akademidomoj konstruiĝos en atentolandoj de la Eŭropa Unio, kie la prezoj de nemoveblaĵoj kreskadas. En la plej malbona kazo ni profitos vendante. Petu de ni rete (hfr@uni-paderborn.de), fakse (0049.5251-163533) aŭ letere (Prezidanta Sekretariejo de AIS, Kleinenberger Weg 16B, DE-33100 Paderborn) pli detalajn informojn, sed samtempe sciigu al ni, kiel kaj kiukondiĉe vi povus kaj pretus apogi niajn klopo-dojn.

OProf.Dr. habiL. Helmar G. FRANK
Prezidanto de AIS

NDLR: Tiu ĉi teksto estas kompilita resumo de teksto sendita de Dr. Helmar Frank al la SAT-sidejo la 27.10.2001. Oni povas legi detalan priskribon pri tiu projekto en la libro "AIS", verkita de Prof. Dr. habil. Reinhard FOESSMEIER, Akademia libroservo, Paderborn 2000.



Prosperan 2002

POLLANDO

LIBERECO POR TOMEK

En la maja numero de Sennaciulo (p. 78) ni aperigis artikolon por subteni Tomek WILKOSZEWSKI. Tra la reto (26.Okt.2001) venis novaĵoj, dank'al nia brazila k-do Johano. Jen parto de tiu teksto:

" Tomek havis ankaŭ iom da ŝanco. Pri tiu ĉi afero interesiĝis homoj ekster la urbo Radomsko. Inter aliaj, helpas al Tomek personoj de ABC/ACK (Anarkiista Nigra Kruco) kaj homoj el kontraŭfaŝisma medio. En Pola TV oni prezentis raportaĵon titolitan "Tumulto" kaj en la "Elekta Gazeto" (plej granda pola ĵurnalo) aperis granda raportaĵo. Antaŭ kamerao kaj dum la interparolo kun ĵurnalistino de "Elekta Gazeto", samlokaj naziuloj kolore priskribis, kiel ili "purigis la urbon Radomsko de malpuruloj" (tiu ĉi vorto rilatas al la homoj kiuj agas en punka movado), kiom foje ili batis Tomek kaj kiel ili atakas aliajn homojn. Ambaŭ raportaĵoj indignigis Pollandon, sed ili ne interesis la juĝistojn. Per helpo kaj subteno al Tomek kaj pri aliaj arestitoj kaj iliaj familioj okupiĝis kontraŭfaŝista movado en Pollando. Oni utiligis ĉiujn leĝajn vojojn por helpi al Tomek. Post 4 jaroj oni sukcesis organizi la nuligjuĝan proceson ĉe plej alta Juĝinstanco. Ĝi okazis la 27-an de septembro kaj la Tribunalo nuligis la verdikton pro malgravaj formalaj eraroj. Nuntempe povas helpi al Tomek nur la amnestio de pola prezidento (1) sed la ŝancoj estas malgrandaj pro nuntempa pola punleĝo.

En karcero Tomek tre bone laboras kaj pasis sian abiturientan ekzamenon. La karcera opinio pri li estas pozitiva. Tamen, la malbonŝanco estas ke lia nuna edukisto estas la estro de loka naciista partio, de kiu Tomek ne povas esperi permeson al studado.

"Wyborska Gazeta" (Elekta Gazeto)
(1) vidu S-ulon, maja numero.



Prosperan
2002

LETERO DE N.I. SEKVOJO

Osiyo, Nathan![(1)]

Pardonu pro mia longa silento, kara amiko mia. La malbona novaĵo estas ke plej kara Binjo forpasis, benita estu ŝia animo. Ŝi mortis la 30-an de septembro, dum dimanĉo. Ŝi vekiĝis normale matene. Kiel mi, ŝi pensis ke ŝi havus almenaŭ du pliajn monatojn antaŭ serioza kripliĝo aŭ morto. Sed je la deka horo matene, ŝi eksentis katastrofan doloron kaj tuj sciis ke temas pri ŝia mortotago. Mia kaj ŝia kara Judy "Nova" Ficken (kiu tajpis la "Fundamento de Poliespo") estis tie, veninta el Missouri viziti Binjon.
Binjo diris al «Nova» ke ŝi mem mortos tiun ĉi tagon kaj petis al ŝi, ke ŝi telefonu al ŝiaj du filinoj. Ŝi promesis strebi vivi ĝis ilia alveno. Binjo deziris ankoraŭ lastfoje vidi siajn filinojn antaŭ la morto. Nova diris al Binjo: "Nu, mi absolute devas nun iri al funebra ceremonio de mia alia kara amiko. Mi revenos post du horoj. Espereble vi estos ankoraŭ ĉi tie". Binjo konsentis kaj Nova foriris. La du filinoj de Binjo alvenis kelkajn minutojn poste. Kelkajn tagojn poste, Nova diris al mi telefone: "Vi scias kian forton havis Binjo kiam ŝi ion deziris. La forta strebado sukcesis kaj Binjo vidis siajn karajn filinojn ankoraŭ lastan fojon."
La informon pri ŝia morto mi havis la tagon poste, lundon. Ho ve, mi estas forte depremita kaj malfeliĉa post la informo pri ŝia forpaso. Fakte mi jam estis deprimita pro la atako ĉe la Monda Komerca Centro.

N.I. Sekvojo

(1) Osijo estas ĉerokia-indiana esprimo, preskaŭ ĉiam uzata de N.I.S., kaj signifanta "saluton".
NDLR: Ni ricevis tiun ĉi letero de N.I.S. pere de N. GANT, kiu fariĝas respondeculo de la Defend-Komitato de N.I.S.

Amnestio internacia

El "MONATO"

AMNESTIA KRITIKO *

Amnestio Internacia kritikis la ĉehan policon pro la agoj dum la kunsidoj de Internacia Mona Fonduso kaj de Monda Banko pasintjare septembre en Prago (Monato, 2001/1 - p.12-13). La polico arestis grupojn da agresemaj radikaluloj, ĉefe tiujn, kiuj atakis la policanojn gardantajn la Kongresan Centron, en kiu la kunsidoj okazis. En la policdeĵorejoj oni traktis la arestitojn nehumane, humiligis ilin, batis ilin, ne permesis uzi necesejon nek telefoni, kaj ne ebligis ĉeeston de advokatoj. La surstratajn tumultojn observis la t.n. civitanaj juraj patroloj, iniciatitaj de studentoj, sed tiuj ne rajtis ĉeesti en la policaj deĵorejoj kaj kontroli la konduton de policanoj. La polica estraro kaj la porparolanto de Ministrejo pri Internaj Aferoj rifuzis iun ajn kritikon, apogante sin sur la simpatioj de la publika opinio, kiu grandparte kondamnis la ekscesojn de la radikaluloj. Tamen estas necese agnoski, ke misagoj fare de policanoj okazis, kaj sekve estas urĝe necese la aferojn esplori. Ĉar puni kontraŭjurajn kondutojn de policanoj kontraŭ deliktuloj estas unuaranga afero de demokratia ŝtato.

Jiri PATERA (Ĉeĥio)

* Tiu teksto aperis en "Monato" (septembro 2001) en la rubriko "Leteroj". Same oni atendas senpacience la procesojn kontraŭ la italaj policanoj kiuj brutale agis en Ĝenovo kontraŭ la manifestaciantoj.



LIBERESPRIMO EN USONO

Michael ITALIE, membro de la usona Socialista Laborista Partio, kandidatas kiel urbestro de Miami. Eksciante tion, Denuci PASTRANA, estro de la firmao GOODWILL (kie laboras M.I.) decidis maldungi lin. Oni sciu ke GOODWILL (Bona volo en Esperanto) ĉefe kolektas kaj disdonas fabrikaĵojn por la malriĉuloj en Suda Florido...

(Laŭ informoj de N. GANT)

INFORMOJ PRI LA EŬROPA SUPRO EN BRUSELO - 13.-15.12.2001



Tiuj linioj estis verkitaj la 15-an de novembro 2001, kaj jen la informoj kiuj atingis la SAT-sidejon pri la programo de la diversaj antaŭviditaj manifestacioj:

I.

Ĵaŭde la 13-an - je la 10h00
Manifestacio (marŝado) organizita de la SEK (Sindikata Eŭropa Konfederacio) kiu arigas 80 milionojn da membroj, en la diversaj reformistaj sindikatoj.
Tiu marŝo komenciĝos en LAEKEN (avenuo Emile Bockstael) kaj finiĝos en la stadiono ROI BAUDOUIN (eks HEYSEL).

Vendrede la 14-an - je la 11h00
Internacia manifestacio de la «PETIT CHATEAU» en Bruselo (Boulevard 9e de ligne) ĝis la parko STUYVEHBERGH, en LAEKEN, proksime de «GRAND CHATEAU».

Sabate la 15-an - de la 10h00-12h30
1. Internacia Asembleo en la «Auditoires Universitaires» de l'U.L.B.-V.U.B. (Université Libre de Bruxelles), Campus de SOLBOSCH, proksime de la «BOIS DE LA CAMBRE», 50, avenue Franklin Roosevelt - 1050 Bruxelles.

2. **De la 13h30 - 16h00**
Internacia manifestacio de la U.L.B.-V.U.B. ĝis la Place Schuman.

3. **Ekde la 16h00**
«STREET-PARTY», koncertoj ktp. en la Place Schuman.

II.

SAT eldonis 6-lingvan flugfolion (nederlande, france, germane, hispane, angle kaj esperante). Vidu sur apuda paĝo tiun tekston en Esperanto).
Oni jam povas mendi ĝin ĉe SAT-sidejo kontraŭ pago:
100 ekz. - 50 FRF (7,62 €)
200 ekz. - 75 FRF (11,43 €)
500ekz. - 150 FRF (22,87 €)
1000 ekz. - 200 FRF (30,49 €)
plus sendokosto.

III.

Grupo de parizaj k-doj veturos de Parizo al Bruselo vendrede la 14-an posttagmeze. Ili proponas al belgaj (kaj nebelgaj) SAT-anoj (kaj ne-SAT-anoj) renkontiĝi je la 9-a horo kaj duono ĉe la enirejo de la «AUDITOIRES UNIVERSITAIRES» por partopreni la debatojn kiuj tie okazos.
Dum tiu mateno estos decidite partopreni (aŭ ne) la posttagmezajn manifestaciojn.
Evidente ĵaude kaj vendrede, SAT-anoj povos partopreni la antaŭviditajn programerojn.
Se iuj gekamaradoj intencas jam partopreni parton aŭ tuton de la programo, estus utile ke ili informu la SAT-sidejon.

ĈIUJ AL BRUSELO INTER LA 13-a KAJ 15-a DE DECEMBRO 2001

NI RIDU.....

Aviadiloj de neregistara organizo «International rescue Committee» lanĉis flugfoliojn super Kosovo por atentigi pri estontaj paraŝutadoj: «Restu en ŝirmejoj; la nutraĵoj falontaj povus vundi vin».



Kredyt Bank, Pola societo, monsubtenas la vojaĝon de la papo Johano Paŭlo la 2a : «Ni ŝuldas ion al li; dek jarojn antaŭe, danke al li, Pollando eniris la vojon al merkat-ekonomio».

****

La poŝtaj servoj de Usono detruis milionojn da poŝtmarkoj, sur kiuj oni situas la Grandan Kanjonon en Kolorado anstataŭ en Arizono.



Prosperan
2002

TEMAS PRI DEMOKRATIO !
.... inkluzive lingva !

JES por tutmondiĝo konstruita de la civitanoj kaj popoloj ;
JES por demokratio jura kaj fakta, bazita sur egaleco kaj libereco.

Jure ĉiu povas informiĝi kaj sin esprimi libere.
Sed fakte, **NE** !

La amaskomunikiloj obeas al la financaj potenculoj kaj nur komunikas la "elitoj" helpe de mono kaj de la supera klaso.

Nur 5% de la homaro povas sin esprimi !
Kaj la aliaj ? (95%)

KAJ VI ?
Apud nia gepatra lingvo ni bezonas lingvon komunan, sendependan, alireblan al ĉiuj, kiu subpremas neniun kulturon, kiu eliminas neniun minoritaton.

NUR ESPERANTO ebligas komunikadon inter egaluloj, komunikadon demokratan kaj fratecan.

Kontaktu: S.A.T. (Unuiĝo de la laboristaj esperantistoj el la tuta mondo).

KOMUNIKO
Komence de februaro 2002 okazos en MUNKENO «Konferenco por sekurecpolitiko», militisma kunveno de registaranoj kaj NATO-militstrategistoj, en hotelo «Bayerischer Hof». Sur la placo Marienplatz okazos la 01.02. je la 17h00, kaj la 02.02 je la 12h00, manifestacioj kontraŭ la politiko de NATO.

Laŭ informoj de Ronaldo

EL LA GAZETARO

☆ En "CNT" (organo de la Nacia Konfederacio de la laboro en Hispanio) aperis (n° 272, Sept. 2001) artikolo pri la 74-a SAT-kongreso en Nagykanizsa kaj pri la 75-a okazonta en ALICANTE (ES).

☆ Preskaŭ samtempe aperis raportaĵo pri la 74-a SAT-kongreso en la Sept-oktobra numero de "Le Monde de l'Espéranto" (dulingva gazeto esperanto-franca, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris) sub la plumo de Monique Prezioso, Jeanine De Wilde kaj Carmen Segarra.

EL LEA GAZETARO

De pluraj numeroj, la bulteno de la Sveda laborista Esperanto-Asocio "SLEA-Bulteno", aperigas multajn tradukojn de artikoloj kiuj estas verkitaj en svedlingvaj gazetoj (Metro, Syndikalisten, Arbetaren, L.S., Avisen). La junia numero estas aparte interesa. Ĝi prezentas la "bagatelon" de 16 tieaj tekstoj! Ĉiuj estas interesegaj. Jen la titoloj :
- Unueco estas nia forto (Bangladeŝo)
- Kancero - pacientoj asignas la ŝtaton (Francio)
- Pli da fiherboj pliigas la rikoltojn en la evolulandoj
- Italio (pri la ĵusaj balotoj)
- Kolumbio
- Zimbabvo (politika kaj socia krizoj)
- Kongolo (same)
- Turkio (same)
- Ĉeĥio (perfortoj de ĉeĥaj policistoj)
- Kubo (vizito de David Rockefeller al Fidel Castro)
- Ekvadoro (sociaj bataloj)
- Ĉu la tuta vero aŭ nur la plej bonaj fragmentoj?
- Polico ekzistas por servi la ĝeneralan publikon.
- La espero povas savi nin el mensa glaciepoko.
- Trolaborantaj japanoj ne eltenas la laborritmon.
- Havi gajninteresojn en la malsanulflegado estas malsanece.

Ĉar Sennaciulo ne povas reprodukti ĉiujn, vi trovas ĉi-numere tiun pri trolaborantaj japanoj. Por legi la aliajn ni povas nur konsili ke la interesatoj abonu SLEA-informilon : 50 SEK ĉe:
S.L.E.A.
Poŝtĝiro: 5 31 60-8
Rusthallarvägen 129
SE-128 44 BAGARMOSSEN, Svedio



Al nova socio, novaj konfliktoj



Prosperan 2002

Vegetaranigi

Mi eble povas trovi kelkajn kialojn kial vegetarano malsaniĝas. Unue, eble oni trinkas tro da lakto, kio povas esti tre malbona por la sano; due, se oni estas vegetarano, oni bezonas multajn verdajn legomojn (pro la fero).
Estas strange kial unu persono sanas sed alia malsanas, sed eble oni manĝas malsamajn manĝaĵojn. Trie, eble oni ne konsumis sufiĉe da vitaminoj B12 (de ekstrakto de gisto, la Japanaj «miso» ktp). Mi opinias ke estas butikoj en Parizo kie oni povas aĉeti ĉi tiujn.
Mi opinias, ke se oni estas vegetarano oni devas manĝi la ĝustajn manĝaĵojn.

Marion Alcock.

******

Nia K-do Peyraut ekspedis al ni eltiraĵon el semajna gazeto "Courrier International n° 528 de 14/12/2000" en kiu J.P. Vomorin reliefigas parton el malnova libro.
Eltiraĵo el Prelegaro «Sano kaj Malsano» de Rudolf Steiner (1923) (!!!):

"Kio okazus se, anstataŭ vegetaĵojn, la bovo ekmanĝus viandon? Ĝi pleniĝus interalie de ureato kaj de ureata acido. Sed koncerne ureaton, ĝi posedas kutimojn apartajn. Tiuj apartaĵoj de ureato estas posedi emon por la nerva sistemo kaj por la cerbo.
Se bovino senpere manĝus viandon, rezultus sekreciado de grandega kvanto de ureato. Ĝi irus al la cerbo kaj la bovino iĝus freneza.. "
En 1923… ĉu kredeble?

****

Post preskaŭ unu jaro da nombraj kaj interesaj interŝanĝoj, estas oportune fermi tiun temon «la Nutrado».
Ni ricevis tiun tekston de k-do Gero, kiu estos la finbanderolo de la afero.
Uf !

****

SOLIDARECO, mia am'

La nutrado estas la plej konkreta temo pritraktebla en Sennaciulo. Mi legis kun intereso la diversajn kontribuojn, kaj mi opinias oportune iom analizi la problemon laŭ malpli proksima vidpunkto.
Manĝi kaj dormi (alia temo?) estas elementaj homaj agadoj. Estas do nature pritrakti ĝin nombre kaj vigle. Estas interese konstati, ke disvolviĝis en la lastaj monatoj kaj en pluraj landoj viglaj manifestacioj por iel protekti la «rajton bone manĝi.» Nombraj kamparanoj eĉ unu fojon malmuntis eĉ la simbolon de fimanĝado: Mak Donalda manĝejo. La afero vokis multajn simpatiojn kaj miloj da homoj proteste subtenis la ĉefakuziton, José Bové.
La bataloj kontraŭ Mondskala Organizo pri Komerco (MOK) ĝermis precipe el la fiagadoj de kelkaj grenfirmaoj, kiel Monsanto. Kaj la debato plilarĝiĝis cetere al kapitalisma logikeco en multaj ekonomiaj branĉoj. Ĝi kreskas en ĉiuj kontinentoj en la kutime konservema terkulturismularo sed mirinda socialisma tradicio.
Estas do bona tago por sin demandi ĉu ni ne eniris jardekon de novtipaj bataloj. La viglaj manifestacioj de Gotenburgo, Ĝenovo, Seatlo, ktp… apogas tiun ideon. Kaj en tiu kazo ni SAT-anoj devas analizi tiun evoluon.



Elterigo de transgena maizo far José Bové

Unuavide la «manĝobatalo» estas paradoksa. Plena egoismo, kiam temas pri sia propra nutrado. Oni serĉas konservi (aŭ retrovi) altan kvaliton de persona vivo. Pura altruismo kiam oni klopodas provizi nutraĵojn al popolo en escepta katastrofo.
La egoisma batalo ne atingas altajn rezultojn: la amas-gazetaĉoj emociigas la homojn, kaj kreante timon ili altiras neraciajn kondutojn. La sukcesoj de Verdulaj Partioj en diversaj landoj ne kongruas kun la malrapidega evoluo de konkretaj kondutoj favore al mediprotektado. Ni ne plu scias kiel forlasi la aŭton, la kemie venenigajn kuracilojn, aŭ la stultan turismon ĝenerale. La (relative) sukcesaj manifestacioj kontraŭ MOK eble venas el la dua flanko de la paradokso.

La altruisma batalo estas videbla multofte, kiam oni moviĝas por defendi la rajtojn de la aliaj (sendokumentuloj, rasismaj krimoj, …). Hodiaŭ gi estas novtipa koktelo plene aktiva en la sociala movado. Ĝia ekzisto fontas el la kunfandiĝo de tri kulturaj retoj:
la kristana (tra ideo de helpo kaj protekto al proksimuloj),
la humanisma de la XVIII jarcento (tra kohera mesaĝo por homrajtoj kaj individuaj liberecoj)
kaj trie, la socialisma (tra la espero al justa kaj egaleca socio).

La kaŭzoj de tiu naskiĝo de nova sociala movado estas diversaj. Tre skeme ni povas unue aserti, ke «al nova socio novaj konfliktoj» (laŭ la esprimo de sociologo Alain Touraine). Plie la graveco de la problemoj estis tiom akraj, ke multaj organizoj devis agadi laŭ novaj metodoj, pli konkretaj kaj pli modestaj. Oni povas rapide doni kelkajn frapajn nomojn: Greenpeace, Amnesty International, Kuracistoj sen Landlimoj… En okcidentaj landoj oni eĉ sin dediĉas al proksimaj bezonuloj (senhejmuloj, frapitaj virinoj, senlaboruloj, aidesuloj, ktp). Ni ofte plendas pro manko de sindonemuloj; ili ekzistas ja, sed laŭ alia spirito.
Tiuj faktoj estas nediskuteblaj; se estu diskuto, tiam estu por scii, ĉu el tio povas rezulti bona paŝo por socialismo. Kaj je kiaj kondiĉoj?

Gero

P.S. Tiu kontribuo prefere fermu la temon nutrado pri kiu ni «ŝatas».
Eventuale «solidarecaj agadoj» povus esti nova temo por 2002… kaj ek al la plumoj.
La pasintaj kontribuoj estas en la TTT-ejo de Amikeca Reto (rubriko forumoj): <http://www.creaweb.fr/a.reto>
Sendu viajn artikolojn prefere per interreto aŭ per disketo laŭ formato txt, eml aŭ html al <a.reto@france-association.com>
Via fakredaktoro: G. Rollin; 88, str. Viktor Hugo; FR-37 400 AMBOISE

Viaj reagoj....

Bonvenon al ŝlositaj pordoj

Ĉu iam vi spertis tian "bonvenigon". Probable ne. Sed dum la pasinta SAT-Kongreso en Nagykanizsa sufiĉe multaj kongresanoj, alvenintaj ne dum la sabata antaŭtagmezo, trovis kaj grandan rubandon BONVENON kaj.... slositajn pordojn! Ili ja ne povis antaŭvidi, ke la organizanto (estis nur unu persono; oni povas poste kompreni, kial pluraj helpemuloj sentis sin forpuŝitaj), decidis funkciigi la akceptejon nur dum du horoj (!), sole dum tiu sabata antaŭtagmezo. Tiuj, kiuj ne povis obei lian kondiĉon - kaj efektive venis multaj post tiu tre limigita tempo pro longdaŭra vojaĝo - do staris surstrate, tamen dum bela vetero, feliĉe! Nenia indiko ekzistis, kien oni povas sin turni por trovi sian tranoktejon, kiam (kaj ĉu entute) funkcios la akceptejo, kia programo estos kiuloke ktp.ktp. Tiel komenciĝis la 74-a SAT-Kongreso.... Rigardante la fuŝfaritan aliĝilon oni ja povis antaŭvidi ion tian. Kiel multaj aliaj, malgraŭ mia tre frua anonco mi ne eksciis jam hejme, kie mi dormos dum tiu semajno. Sed feliĉe en la junia numero de S-ulo ekzistis urba mapeto, tamen kun kelkaj indikoj nekutimaj. En ĝi la stacidomo ne videblis, sed jes ja "ferhoma domo". Ĉu eble temas pri preseraro? Do, ni vidos... Inter la 30 numeroj de tiu mapeto troviĝis ankaŭ du studenthejmoj, n-roj 14 kaj 17. Do, en la kazo, ke neniu atendos en la stacidomo donante informojn, mi veturos al unu el ili. (Eble mi estos bonŝanca elekti la trafan). Sed estis eraro! Neniu el la du dormlokoj estis je dispono. Mi dormis en hoteleto je tute alia adreso.

Kaj tiel la fiaskoj daŭris. Miajn "dokumentojn" mi ricevis nur lundon, iun programon neniam. De tempo al tempo mi rigardis la cetere tre malprecizan kaj ne kompletan programon de aliaj partoprenantoj. Ĝi prezentis mirindan ekzemplon, kiel oni NE preparu kaj surpaperigu programon: malprecizaj kaj eĉ malĝustaj informoj pri horoj, lokoj ktp. Kaj cetere, por reveni al la urba mapeto: en ĝi legeblis kiel geografia indiko ĉefstrato. En la tuta mondo oni ne trovas straton kun tiu nomo, kaj vane vi petus helpon surstrate de iu enloĝanto montrante tian "urbomapon". Kial la organizanto ne indikis la veran hungaran nomon: Fö ut. ? Ĝi estas eĉ pli mallonga. Evidente li havas nek fantazion por imagi la situacion de eksterlanda vizitanto en tiu urbo, nek li pruvis la plej etan organizan kapablon. Al la serio de mankoj apartenis ankaŭ, ke samtempe kun la t.n. akcepto (en kiu rajtis partopreni nur personoj elektitaj laŭ lia persona gusto) okazis spektaklo de folklora grupo. Sekve tiu ensemblo prezentis sin antaŭ preskaŭ malplena salono... kaj la restaĵojn de tiu bufedo oni proponis poste al la homoj, kiuj antaŭe ne estis honorigitaj per speciala invito. Unu el tiuj homoj reagis ŝokite : "Skandalo!" Alia grava manko estis, ke samtempe kun gravaj prelegoj okazis ekskursoj.


Ĝis la fino de la kongreso mi esperis ricevi liston de partoprenantoj. Vane ! Informo de iu kompetentulo: "Li faras kion li volas." Rezulto de tio estis: Listo ne aperis. Mirinde ke spite al tiom da organizaj mankoj, dum la kongreso regis - kiel ĉiam - tre bona kaj amika etoso.

Por mi persone okazis speciala evento. Por merkredo je la 9-a horo mi ricevis de li "inviton" veni al la oficejo de Sponzor Tours. Mi ne konis la kaŭzon de tiu postulo, tamen mi iris tien. La organizanto ne estis. Afabla oficistino telefonis al li, kaj li promesis veni post 30 minutoj. Sed tiel ne okazis. Mi do foriris ankoraŭ ne komprenante la kaŭzon de lia postulo. Nur poste hazarde renkontante min li klarigis, ke mi ankoraŭ ŝuldas monon. Kial ? Ĉio estis plene pagita, jam en oktobro 2000.


Konkludo: Neniam antaŭe mi ĉeestis tian tiom malbone organizitan SAT-Kongreson.

Kun tre malbonaj memoroj:

Nora Caragea



Ni legis por vi



"Socia rolo de kromamantoj" - en konservado de monogamia geedzeco. *Aŭtoro: Agenita Ameno. Esperantigis Paulo Sergio Viana. Eldonis Gilbert G. Ledon. 84 paĝoj. Prezo: 10 USD.*

La "fenomeno" kromamantoj estas universala. La aŭtorino, A. Ameno, analizas ĝin per paradoksa pensmaniero. Ĉu vere la kromamantoj ludas socian rolon? A. Ameno klarigas (12-a paĝo) ke "la ĉefa celo de ĉi tiu analizado estas ekzameni la hipotezon, ke laŭ ĝia prezentiĝo, amrilato esence rolas kiel konservilo al la geedzeco kiel tradicia monogamia sistemo. Ne temas pri la studado de eksteredzaj sporadaj rilatoj.... sed pri ekstergeedza daŭra interrilato...". Praktike temas precipe pri la rolo de la kromamantino.

La aŭtorino traktas i.a. la punktojn: la socia devigo geedziĝi, la merkato de sensacoj, la virina revolucio.

Al la demando: "Kial kromamantino ne sekvas la monogamian strukturon?" - la aŭtorino respondas: "...ĉar viro, kiel kreanta elemento, ne ŝanĝiĝis... La kromamantino ludis la rolon de ia patrino, kiu alivestiĝis kiel virino, kun la celo daŭrigi la geedzecon de individuo kun patrino."

Se vi ne konsentas kun tiu vidpunkto, se vi deziras scii kiamaniere la aŭtorino maturigis tiu(j)n konkludo(j)n, vi povas evidente legi la broŝuron mem.

I.P.

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris
Tel: +33.1.47.97.87.05
Fax:+33.1.47.97.71.90
Rete: satesper@noos.fr

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke en la jaro 2001 ni povos eldoni ĝin. Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

FINIĜIS ANTAŬPAGO POR NOVA P.I.V.


Dum la kongreso en Nagykanizsa, SAT decidis fini la antaŭpagperiodon kun rabatita prezo por la nova PIV. Ekde ĝia apero oni povos aĉeti ĝin laŭ la normala vendoprezo. La definitiva vendoprezo kaj la aperdato de la nova PIV estos anoncitaj en la reto kaj en E-gazetaro.

FONDUSO NOVA PIV
MKE 47 eŭroj

HELPO AL LA ASOCIO
En Parizo (€): MKE 100; J. Bousson 28,97; A. Mairal Cabrero 10,67; P. Freslon 91,47;

SOLIDARSERVO
MKE 50 eŭroj

NOVALIĜOJ
35.512 BORDES Santi, Aptd. de Correos 159, ES-03720 Benissa, Alikanto, Hispanio
35.513 *Ralalarisoa Justine, Lot IIC-72-FD Manjakaray, MG-101 Antananarivo, Madagaskaro





Prosperan
2002

NEKROLOGO

La 24.10.2001 mortis en Düsseldorf (DE), 88-jara, nia fidela kaj tre aktiva membro, kamarado


Carl-Ludwig THIES
(matr. 27.174)

Li apartenis al nia asocio jam ekde 1956, kiam lia patro estis prezidanto de la urba LEA/G-grupo. Ni kondolencas al la filino s-ino Vera Brauer kaj la familio.

Ĉu Svedio estas survoje al polica ŝtato?

Demandas: P. Persson

La polico en Gotenburgo ne povis fari diferencon inter pacemaj kaj perfortemaj manifestaciantoj. Post tiam estas levitaj akuzoj kontraŭ multaj manifestaciintoj, (kaj ankoraŭ ĉirkaŭ 500 akuzoj estos levotaj). La kondamnoj estas efektivigitaj en rapida takto kaj la punoj estas tre severaj. Ili estas tiom severaj ke multaj advokatoj reagis pri tio ke la punoj ne havas ekvivalenton en internacia kaj enlanda jurkutimo. Krome la advokatoj indignas, ĉar la pruvpostuloj malaltiĝis kompare kun tio kio estas kutimo en la sveda juro.
La plej grava kio okazis en Gotenburgo estis ke la sveda polico pafis per 12-13 kugloj kontraŭ manifestaciantojn. Tri homoj estis vunditaj el kiuj la 19-jara Hannes Westberg estis vundita ĝis mortminaco. Li perdis la lienon, unu renon kaj multe da sango.
La tribunalo donis al Hannes Westberg unu kaj duonan jaron en malliberejo. Per sesmonata redukto pro malalta aĝo, kaj pro la pafdamaĝo ankoraŭ kvar-monata redukto, la fina puno reduktiĝis al okmonata mallibereja restado. La supera prokuroro nuligis la preparan ekzamenadon kontraŭ la policistoj kiuj pafis al Hannes Westberg, malgraŭ ke esti s multaj atestantoj kiuj atestis ke la policistoj ne estis en mortdanĝera situacio kiam ili pafis al Hannes Westberg. Alia grava afero estis ke la policistoj protektis dekstrulajn manifestaciantojn kiam tiuj provokis la pacemajn manifestaciantojn.



75-a KONGRESO DE S.A.T.
ALICANTE (ES)
1-8.07.2002

Organiza Kongresa Komitato :
Prezidanto: Martin Bustin Benito, Apt° de Correos 4143, ES-03080 Alicante.
Tel.: 00.34.965184596
Rete:<marteno@ctv.es>
Bankkonto: Martin Bustin Benito,
BBVA 0182-0102-16-0203052953.
Sekretariino : Liya Maziy (sama adreso)

Kotiztabelo en €

Kategorio	Ĝis 31.12.2001	31.03.2002	31.05.2002	Poste
SAT-membro	46,15 €	55,38 €	66,15 €	76,92 €
SAT-geedzoj	73,85 €	89,23 €	106,15 €	123,08 €
SAT-gejunuloj	23,08 €	27,69 €	33,08 €	38,46 €
Gastoj	61,54 €	70,77 €	81,54 €	92,31 €
Gastoj-geedzoj	96,92 €	112,31 €	129,23 €	146,15 €
Gastoj-gejunuloj	30,77 €	36,92 €	43,85 €	50,77 €

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.

ANTAŬKONGRESO
Prezoj por la restado estas:
Loĝado kaj matenmanĝo .... 20 €
Loĝado, matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo....... 30 €
Apartaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo............................... 5 €
Alveno:
La 28.7.2002. Vespermanĝo kaj tranokto en la universitato.................................... 25 €
La 29-an. Matenmanĝo, vespermanĝo kaj tranokto en la Universitato.................. 25 €
La 29-an. Tuttaga ekskurso al urbo Valencio. Vizito de la urbo kaj tagmanĝo en restoracio.. 36 €
La 30-an. Matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj tranokto en la Universitato 30 €
La 30-an. Vizito de la urbo Alikanto.

KONGRESO
La ĉambroj estas unulitaj kun unu banĉambro en la koridoro por ĉiuj tri ĉambroj. Nur kvar ĉambroj dulitaj estos disponeblaj kies prezo estas 30 € kun matenmanĝo. La aŭtobusa trafiko estas sufiĉe ofta ĝis la 22h30. Poste la aŭtobusoj ne plu funkcias.

ALIAJ LOĜEBLECOJ - HOTELOJ	unulita	dulita	trilita	kvarlita
Hostal - Residencia CAMPOY	20 €	33 €	43 €	
Hostal -Residencia LA LONJA	26 €	38 €		
Hostal CATALUÑA	23 €	43 €	50 €	
Hotel CERVANTES	31 €	49 €		
Hotel-Residencia EL ALAMO	46 €	58 €		
Hotel Alfonso EL SABIO		65 €	86 €	102 €

Capitán Segarra 5208624
" " 5203433
Gerona 5207366
Pascual Pérez 5209822
San Fernando 5218355
Alfonso el S 5203144

Ĉiuj prezoj sen matenmanĝo. La Hostal-Residencia CAMPOY ne havas aermalvarmigilon. La aliaj estas bone ekipitaj.

KOTIZOJ - ABONOJ DE LA JARO 2002

NEPRE ATENTE LEGU LA ĈI-SUBAJN RIMARKOJN

- Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas SENNACIULON + ĝian jaran suplementon, S.R., kaj la dujaran SAT-Adresaron.
- El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo, 60 % la abono.
- Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25j.) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- **Help- kaj grupmembroj pagas minimume la duoblon de la plena kotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.**
- Samfamiliano de membro pagas la duonon de la plena jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekz. dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

* Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas aboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon «Sennacieca Revuo».

Landaj perantoj	Valuto	Kotizo + abono	Nura abono
Argentinio : Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, AR- Q 8302 AOW Neuquen.	€	25,10	27,40
Aŭstralio: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>	AUD	80,00	88,00
Aŭstrio : Dr. Klaus Karner, Schützenstr.-44e, AT-6020 Innsbruck, pĉkt.-3799.466 (Oester. postsparkasse, Wien, konto 000-0025223-03)	€	46,60	51,00
Belgio : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hofter Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: <j.schram@skynet.be>	€	44,70	50,00
Bosnio-Hercegovino : Ivica Horvat, Artava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo	€	5,20	5,70
Brazilio : G.R.-Ledon, C.P.-269, BR-12460-000 Campos-do-Jordao-SP. Reto:<ssledon@iconet.com.br>	€	19,40	22,00
Britio : Arthur Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.: +44.1.277.22.89.62)	GBP	31,00	34,00
Bulgario : Ganĉo Damjanov, Makariopolski 7, BG-6100 Kazanlak.	€	7,00	8,00
Ĉeĥio : Vlada Hasala, A.Dvoraka 1, CZ-69662 Straznice. Reto:<vlada_hasala@iol.cz>	CZK	530,00	580,00
Ĉinio : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiying-lu 74 Hao, CN-710054 Xi'an. Reto: <esp@pub.xaonline.sn.cn>	CNY	30,00	33,00
Danio : Ulrik Rasmussen, Nörregärdsvej 66, DK-2610 Rödovre.	DKK	370,00	410,00
Estonio : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.	EEK	95,00	105,00
Finnlando : Vakas	€	45,50	51,00
Francio : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, pĉk.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<pierre.quillaud@wanadoo.fr>	€	48,00	52,00
Germanio : Jiri Proŝkovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund, pĉk.-9168-434 Postgiroamt Essen (BLZ-360 100 43). Reto: >proskovec@aol.com>	€	49,00	54,00
Hispanio : Martin Bustin Benito, Apartado de Correos 4143, ES-03080 Alicante, bankkonto: BBVA 0182-0102-16-0203052953. Reto: <marteno@ctv.es>	€	27,10	30,00
Hungario : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <adalber1@matavnet.hu>	HUF	1400,00	1500,00
Italio : Filippo Giuffrida, Via Lombarnero 57, IT-10080 Canischio (TO)	€	43,90	48,03
Izraelio : Jehoŝua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.	ILS	150,00	160,00
Japanio : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>	JPY	8400,00	9300,00
Jugoslavio : Ivan Moĉilnik, Pozeŝka 132, YU-11030 Beograd.	€	5,20	5,70
Kanado : Hans E. Ilginnis, P.O. Box 1133, Ladysmith, B.C. V0R 2E0, Kanado, bankkonto: Sennacieca Asocio Tutmonda CIBC, transit 540, Account n° 0747831; Rete:<hans@nanaimo.ark.com>	CAD	75,00	82,00
Kroatio : Zdenka Svetliĉiĉ, Matoŝeva 6, HR-10410 Velika Gorica, reto: <sat.hr@esperanto.nu>	HRK	50,00	55,00
, Morelinho, PT-Latvio : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45	LVL	4,00	5,00
Litovio : Grazina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-5503 Mazeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>	LTL	20,00	22,00
Nederlando : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.	€	43,20	48,00
Norvegio : Per Engen, Store Presterudvei 35, NO-2300 Hamar.	NOK	410,00	450,00
Novzelando : Vakas	NZD	80,00	88,00
Pollando : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 10601406-300001777438	PLZ	25,00	27,00
Portugalio : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Princi-pal n° 79 , PT-2710-413 Sintra. Rete: <manuelalvespedrosa@clix.pt>	€	19,00	21,00
Rusio : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>	€	7,00	8,00
Slovakio : Miro Zavodsky, Ĉsl.-brigady 67, SK-01004 Zilina-Zavodie.	SKK	400,00	440,00
Slovenio : Zlatko Tiŝljar, Inter-kulturo, Besednjakova 1, SI-62000 Maribor., Tel./fakso:+386.62.100.669	SIT	2500,00	2750,00
Svedio : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127, SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Reto:<ishim@hotmail.com>	SEK	380,00	410,00
Svisio : Erna Döring, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel, pĉk.-40-43136-2.	CHF	84,00	92,00
Ukrainio : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 9307, UA-310003 Ĥarkovo-3	€	5,80	7,00
Usono : Dan Glass, 7366 Park View Terrac, Mounds View, MN 55112., Reto: <dglass19@earthlink.net>.	USD	69,00	77,00
Aliaj ne jam menciitaj landoj			
Eŭropo +-S.Koreio	€	30,50	33,60
Latinameriko +Sudafriko	€	19,90	21,50
Cetera Afriko + Sud-Azio	€	18,30	19,90
Reto:<ishim@hotmail.com>			

Karaj gekamaradoj,
kiel vi povas konstati, ankaŭ ĉi-jare ni ne plialtigis niajn kotizojn. Fakte, jam de kvar jaroj la kotizoj estas senŝanĝaj. Sed, pro la malbona financa situacio kaj nesufiĉa membronombro, ni nepre devos plialtigi la kotizojn por la jaro 2003. Certe vi bone komprenas tiun neceson. Por helpi al niaj financoj, vi povas aldoni al via kotizo iom da mono por Helpo al la Asocio. Elkoran dankon. La P.K. de SAT